FERVOJA ESPERANTISTO

Informilo de Germana Esperanta Fervojista Asocio

Mitteilungsblatt der Deutschen Eisenbahner-Esperanto-Vereinigung
in der Stiftung Bahn-Sozialwerk

Fondita 1952 | Numero 3 | Julio/Septembro 2007

Monumento honore al Joachim Gießner



La nova monumento honore al Joachim Gießner en Herzberg
post la inauguro, la 30-an de junio 2007
(vidu paĝo 3)

Brila IFEF-Kongreso 2007



Por la kvina fojo estis la metropolo Paris la kongresurbo de la Internacia Fervojista Esperanto-Federacio (IFEF). Inter la 12-a ĝis la 19-a de majo 2007 ofertis niaj francaj geamikoj bonege organizitan kongreson al pli ol 270 partoprenintoj. La interkona vespero zorgis pri la kutima konatiĝo inter la alvenintoj. Post honorigo de kelkaj francaj IFEF-membroj aŭdiĝis kantoj kaj poemoj. Regis agrabla etoso inter la alvenintoj.

Por la oficiala malfermo de la 59-a IFEF-Kongreso oni kolektiĝis dimanĉon matene. Diversaj reprezentantoj transdonis salutojn kaj bondezirojn, ĉu flanke de la Libertempa Fervojista Organizo FISAIC aŭ de la Unio Internacia de Fervojoj (UIC). Laŭdojn venis de internaciaj Esperanto-organizaĵoj kiel UEA kaj SAT-amikaro. Post impresigaj salutoj per la reprezentantoj de la landaj IFEF-sekcioj kaj aliaj gastoj malfermis la IFEF-prezidanto Romano Bolognesi la 59-an kongreson de IFEF. Dum la oficiala malfermo muzikis trifoje la fervoja blovorkestro Fer du Nord. Sekvis tradicie la grupa fotado.

En pluraj laborkunsidoj okupiĝis spertaj gekolegoj pri fervojfakaj temoj. Temis ekzemple pri novaj tipoj de lokomotivoj kaj vagonoj, aliaflanke pri pliboniĝoj en la sekurigaj sistemoj. Ĉiuj mezuroj celas por resti konkurenckapabla kontraŭ aŭtomobilo kaj aviadilo. Heinz Hoffmann (DB) prelegis pri „Stacidoma portiko forŝovita".

Tute alia veturilo, nome pasaĝerŝipo, transportis la kongresanojn sur la urba kanalreto de la rivero Seine. Estis agrabla ŝipekskurso, preskaŭ sen pluvo, kun multe da preterpasantaj vidindaĵoj. Agrabla okazo por kontaktiĝi. Alia ekskurso kondukis al la fama baziliko Sacre Coer respektive al la impona kastelo Versailles. Dumnokte ekbrilis la lumanta Eiffelturo. Cetere tiu turo montriĝis sur la multe aĉetita kongresa glumarko. Bonega ideo! Ĝuinda estis bankedo kaj sekva balo, dum kiu bonegaj muzikistoj altiris dancemulojn ĝis noktmezo.

Nepre menciindas la tri kongresbultenoj, modela informservo, servopretaj helpantoj. Dankon, ke ni travivis neforgeseblan IFEF-kongreson. Ĝis venontjare en Poznan (Polando).

W. Barnickel

Monumento honore al Joachim Gießner

Esperanto plu kaj plu videbligas en la Esperanto-urbo Herzberg

Memormonumento honore al la elstara kaj multtalenta Esperanto-pioniro Joachim Gießner estis solene inaŭugurata sabaton, la 30-an de junio, en Herzberg. Mintrajna vagoneto kun tabulo, sur kiu surestas dulingva etbiografio memorigas pri Joachim Gießner kaj lia 50-jara aktiva agado. Krome nova ŝildo malantaŭ la vagoneto bonvenigas la alvenintojn en „Herzberg – la Esperanto-urbo".

La Herzberg-a fervojisto kaj estro de la fervoja stacidomo Gießner (1913 ĝis 2003) dum multaj jaroj estis prezidanto de Germana Esperanta Fervojista Asocio (GEFA), kaj de 1968 ĝis 1990 li estis prezidanto de la Internacia Fervojista Esperanto-Federacio (IFEF). Li ankaŭ estas tre konata por lia ampleksa traduka laboro, ĉefe de ĉiuspecaj kantoj.

La solenan inauguron ĉeestis inter aliaj: la urbestro de Herzberg Gerhard Walter, la prezidanto de la Germana Esperanta Fervojista Asocio (GEFA) Achim Meinel, s-ro Pätzold de la sociala fervojista fondaĵo „Stiftung Bahn-Sozialwerk", Ulrich Mattke kiel muzikisto kaj amiko de Joachim Gießner - kiu festparolis pri la elstara traduklaboro far Joachim Gießner rilate de kantoj al Esperanto, GEFA-prezidinto Rolf Terjung (kiu kolektis la mondonacojn de la membroj de GEFA kaj IFEF por la monumento).

La du novaj Esperanto-objektoj en la antaŭ-stacidoma parko en Herzberg estas du el multaj signoj, ke Esperanto vere iĝas videble en la Esperanto-urbo Herzberg. Dum la venontaj monatoj la urbo preparos 11 belajn bonvenig- respektive revidsalutajn ŝildojn en Esperanto ĉe la enirvojoj al Herzberg. Por 2008 kvar grandaj blukoloraj oficialaj urboŝildoj kun la teksto: "Esperanto-Stadt Herzberg" ("Esperanto-urbo Herzberg") estas planataj ĉe la stacidomaj kajoj.

Esperantlingva urboprospekto estas preparata kaj kvar diverstipaj Esperanto-bildkartoj pri Herzberg baldaŭ aperos. Krome, la manĝokartoj de 20 restoracioj en Herzberg estas aktuale esperantigataj.

La urba konsilo de Herzberg decidis la 11-an de julio 2006, ke Herberg oficiale portos la kromnomo "Herzberg – die Esperanto-Stadt" / "Herzberg – la Esperanto-urbo". Ekde multaj jaroj Esperanto-renkontiĝoj kaj –aranĝoj okazadas en Herzberg, kiuj altiras multajn esperantistajn gastojn. Tie troviĝas la Interkultura Centro Herzberg (ICH), la centra klerigejo de la Germana Esperanto-Asocio kaj sidejo de la germana sekcio de la Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI), krome la oficejo de la Esperanto-societo Suda Harco, kiu ligas Esperantistoj de la regiono. Esperanto estas instruata en ĉiuj lernejoj de Herzberg. Esperanto ankaŭ estas oficiale uzata kiel pontlingvo en la rilatoj kun la pola ĝemelurbo Góra kaj ebligas senperan komunikadon inter la loĝantoj de Herzberg kaj de Góra.

(Gazetara komuniko de Germana Esperanto-Asocio)

Priskribo de fervoja akcidento en la jaro 1902 laŭ la originala versio el tiu tempo

(tial iom vorte tradukita)

Antaŭe: Tiuj fervojaj stacioj *Broich, Saarn* kaj *Kettwig kaj* ankaŭ la fervoja linio, en kiu okazis tiu akcidento, ne plu ekzistas. La tereno de la fervoja linio estas hodiaŭ migrad- kaj bicikla vojo inter *Mülheim (Ruhr)-Broich* kaj *Essen-Kettwig.* Nun la raporto:

Je la 1-a de oktobro 1902 koliziis de *Saarn* veninta vartrajno *Gz 9302 (Gz = Güterzug)* kun la antaŭ *Broich* staranta vartrajno *Gz 9296.* Ĉi tiun trajnon la stacio *Broich* jam retroavizis al *Saam,* kvankam ĝi ankoraŭ ne enveturis la stacion. Pro la kolizio estis konsiderinde damaĝitaj kvar vagonoj, la lokomotivo kaj tri vagonoj ne tiom grave. La trafikpaŭzo kaŭzis longan perturbon de la fervojlinio.

En la stacio *Broich* deĵoris dum la akcidenttago stacioficisto (Asistanto) kaj trakforkisto unuaklasa. Tiu lasta ankaŭ plenumis la telegrafdeĵoron. Mallonge antaŭ la alveno de *Gz 9226* la deĵoranta stacioficisto forlasis sian deĵorĉambron por iri en la atendejon. Iom poste, en komisio de la deĵoranta telegrafisto, iris tien ankaŭ iu hazarde en la deĵorĉambro estanta stacilaboristo, por informi la stacioficiston, ke *Gz 9296* estas avizita. La stacioficisto vokis al la laboristo: „Lasu veni!", sen forlasi la atendejon por informi sin mem, ĉu al la enveturo de la trajno ne ĝenas iu ajn obstaklo, aŭ por mem doni necesajn ordonojn rilate al la enveturo de la trajno. Por eviti al la trajno pli da malfruiĝo, la trakforkisto donis al la trajno, kontraŭ-reglamente, signalon por enveturi, sed sur malĝustan trakon. Kiam la trakforkisto rimarkis sian eraron, li haltindike poziciigis la enveturan signalilon. Dum tiu okazaĵo en la stacio *Broich,* proksimiĝis al la antaŭa stacio *Saarn* la tie traveturenda trajno *Gz 9302.* Por eviti halton en *Saarn,* demandis *Saarn* en *Broich,* ĉu *Gz 9302* povu veni. Rilate al tiu demando, sendis la trakforkisto denove tiun stacilaboriston al la ankoraŭ en atendejo restanta stacioficisto por demandi lin, ĉu tiu de *Saarn* avizita *Gz 9302* povu veni. Kiam la stacioficisto jesis tiun demandon, la trakforkisto komisiis la stacilaboriston en puninda senpripenso retroavizi la trajnon *Gz 9296* en la opinio, ke ĝi jam intertempe enveturis la stacion. La sekvo de tiu malĝusta retroavizo estis, ke la stacio *Saarn* tralasis *Gz 9302,* kaj ke ĉi tiu koliziis kun *Gz 9296,* kies trajnfino ankoraŭ staris antaŭ la envetura signalilo en *Broich.*

La lokomotivestro de la proksimiĝanta trajno povis, pro la lokaj cirkonstancoj, ne ĝustatempe vidi la finon de *Gz 9296.* Post kiam li ekkonis la danĝeron, jam ne eblis eviti la kolizion, spite de apliko de ĉiuj rimedoj.

La kulpo pri la akcidento havis unuavice la stacioficisto, kiu ne zorgis pri sia deĵoro kaj kiu grave malobeis siajn devojn. Li agis kontraŭ § 46,2 de ekspluadordo kaj kontraŭ §§ 13,2 kaj 3 de deĵorinstrukcio por stacioficistoj. Kulpa estis ankaŭ la trakforkisto, ĉar li komisiis stacilaboriston retroavizi la trajnon, kvankam ankaŭ li ne konvinkiĝis, ĉu la traino jam enveturis. Al

trakforkisto ankaŭ tute ne estas permesite, doni tian komision al stacilaboristo.
La trakforkisto agis kontraŭ § 46,2 de la ekspluadordo kaj kontraŭ §§ 20 kaj 27,1 de la instrukcioj por la telegrafa deĵoro. La stacilaboristo estis kunkulpa, ĉar li nerajtigite retroavizis la trajnon. La kulpaj stacioficisto, trakforkisto kaj stacilaboristo estis juĝe punitaj pro neglekta endanĝerigo de la fervoja transporto. La staciofiсiston kaj ankaŭ la trakforkiston oni kondamnis al kosta kompenso.

Trovita en *„Die Ruhrtalbahn“* de *Friedhelm Stöters* kaj tradukita de *Rolf Terjung*



Das Bahnhofsgebäude Mülheim (Ruhr)–Broich – lange vor dem Abriss

Spenden für Gießner-Gedenkstätte

Dank guter Zusammenarbeit der Stadt Herzberg, des Esperanto-Zentrums Südharz, des Deutschen- Eisenbahner- Esperanto-Verbandes (GEFA) und der Stiftung Bahnsozialwerk (BSW), konnten wir vor dem Bahnhof Herzberg eine würdige Gedenkstätte für unseren verdienstvollen Esperanto-Pionier und langjährigen GEFA-Präsidenten, Achim Gießner, eine würdige Gedenkstätte errichten.

Folgende Personen haben durch ihre teils großzüge Spende zur Finanzierung beigetragen. Besondere Erwähnung verdienen das BSW und unser Mitglied Heinz Schindler. Für die Finanzierung sorgte Rolf Terjung ."

Bartling. Klaus + Inge
Bauer, Heinrich
Böhnke, Klaus
Busch, H.+M. + Dandorfer, H.
Caragea, Nora
DEFA
Ehrlich, Bodo
Feißt, Hansgeorg
Frank, Marianne
GEFA
Haentschel, Gerhard
Hartig, Heinz-Dieter
Hauge, Sabine
Haupt, Reiner
Hauswald, Erich
Hoffmann, Heinz
Hohl, Werner
Jäger, Albert
Kohl, Barbara
Kölsch, Willi
Kronshage, Anton
Krüger, Siegfried
Lautenbach, Fritz
Lepke, Werner
Mester, Wilfried
Narten. Karlheinz
Nitsche, Otto
Papenfuss, Heinz
Petzold, Dietmar
Purschke
Rabenstein, Heinrich und Elisabeth
Retzlaff, Manfred
Rösemann, Otto und Gertrud
Schindler, Heinz
Schmidt, Annemarie
Schneider, Martin
Schrapp, Ursular
Schwarz, Barbara+Wolfgang
Spill, Christel
Stiftung BSW
Stiftung BSW
Stuppnig, Martin
Ullmann, Walter
Vogelsang, Helga + U. Weißhaupt
Weber, Wenzel

Nachruf

Seine letzte Reise hat angetreten

Erwin Domesle

* 18.1.1922 † 13.6.2007

Seit dem IFEF-Kongress 1967 in Fulda, bei dem er Kongressteilnehmer beherbergte, war Erwin Domesle treues Mitglied der BSW-Esperantogruppe Fulda.

Wir trauern mit seiner Frau, seinen Kindern und deren Familien um ihn.

Nachruf

Sia verda koro paliĝis!

Unser langjähriges treues Mitglied, Besucher unserer Zusammenkünfte und Kongresse

Lokomotivführer

Alfred Gissibl

verstarb am 12.7.2007 in Garmisch-Partenkirchen im 83. Lebensjahr.

Wir trauern mit seiner ihn treu umsorgenden Lebensgefährtin Amelia Garcia um einen Freund.

Kalendaro

23.09.2007 14.30 Uhr in Bad Nauheim, Villa Frankfurter Straße 33
Feier der 100-jährigen Wiederkehr der Anwesenheit von Dr. Zamenhof im Herbst 1907.
Info: Walter Ullmann, Telefon (0 60 31) 46 17

19.-21.10. 2007
Kulturelles Wochenende – 100 Jahre Esperanto in Münster –
in Nordwalde bei Münster
Info: Rudolf Fischer, Tel (0 25 73) 6 26, Rudolf.Fischer@esperanto.de

20.10.2007 REVELO-Tag in Nordwalde bei Münster
Info: Rudolf Fischer, Tel. (0 25 73) 6 16, Rudolf.Fischer@esperanto.de

Redaktfino por FE 4/2007 estos la 15.11.2007
Stiftung Bahn-Sozialwerk Zentrale Frankfurt am Main
Schriftleitung/redakcio: Fritz Lautenbach, Abtstor 21, 36037 Fulda
Tel/Fax (06 61) 7 76 27, E-Mail: fr.lautenbach@fulda-online.de
und Horst Jasmann, Otto-Nagel-Str. 10A, 12683 Berlin
Tel/Fax (0 30) 54 42 361

ESPERANTO - FERNKURSE

I

ESPERANTO – EINE LEBENDIGE SPRACHE

EINFÜHRUNGSKURS

Sie erhalten:
- Lehrbuch
- Tonbandkassette
- 7 Lehrbriefe
- Korrekturen
- Beratung

Sie steigen mit normalen Sätzen aus dem Alltag unmittelbar in die Sprache ein.

KOSTEN: 16 €

II

FORTBILDUNGSKURS

KONVERSACIA KURSO

Viele Situationen des täglichen Lebens werden als Gesprächsstoff behandelt

Sie erhalten:
- Lehrbuch
- Tonbandkassette
- 15 Lehrbriefe
- briefliche Betreuung
- Korrekturen
- Beratung

KOSTEN: 21 €

- leicht und bequem daheim lernen -

MIT DIESEN LEHRGÄNGEN WERDEN SIE FLÜSSIG SPRECHEN

ESPERANTO FLÜSSIG SPRECHEN ZU KÖNNEN, IST EIN ERLEBNIS
GÖNNEN SIE SICH DIESEN ERFOLG!
Bestellen Sie bei: Deutsche Eisenbahner-Esperanto-Vereinigung
Karl Bernhard, Sauerbruchstr. 8, 67063 Ludwigshafen
Lieferung nach Zahlungseingang auf:
Konto 953 729 bei Sparda-Bank Hessen, BLZ 500 905 00